

## & Sic transit gloria mundi!:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 287 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun dediĉo: Respekte dediĉita al la Eks-Ministro Bérard okaze de lia eksigo. Baladigis Martin Strid (2016) per modifo de sveda melodio ŝotisa kaj nova rekantaĵo. Klarigo (\*): S. F. P. E. Societo Franca por Propagando de Esperanto. (Rimarko de la verkinto).>

### (#Melodio:

<:41> (

/LATI DoRe MiFa MiDo; LaTi doTi LaSo MiDo; LaTi doTi LaSo Mi; ReFa MiRe DoMi So; ReFa MiRe Mi Mi;

(#Rekantaĵe: DoRe MiFa MiRe MiDo; LaTi doTi LaSo MiDo; LaTi doTi LaSo MiDo; ReFa MiRe DoMi SoDo; TIRe DoTi LA LA A)

)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 /Ĉiuj grupoj Esperantaj ; Estas denun funebrantaj ; Ĉar Berardo, – ho fatal'! – ; Falis de l' piedestal' ; ; Falis sur postaĵon!

(×:; **Fluas akvo sub la ponto ; ĝis la maro de la monto. ; Sur la ponto pasas multo ; kaj de saĝo kaj de stulto ; kaj por homa honto.**)

'2 Sur postaĵon, jen domaĝo, ; Ĉar ĝi havis pli da saĝo ; Ol la kapo kaj la ventr' ; ; Estis ĝi l' genia centr' ; De l' individuo! .....

'3 Kiom havas li da peno, ; Ĉar li estas sen posteno, ; Eble, ke akceptus li ; Esti nun sekretari' ; De la Sofopoe! (\*) .....

'4 Jen montriĝis la bankroto ; De l' moderna Don Kiĥoto, ; Sed la nomo de Bérard; Restos en la kalendar' ; Eĉ post multaj jaroj. ....

'5 Post jarcentoj kaj jarmiloj ; Al pranepoj de l' prafiloj ; Oni montros en muze' ; La ĉefverkon de pigme' ; ; Lian cirkuleron! .....

'6 Ĉiuj diros kun rideto:; "Tio pravas, ke dekreto ; En mil naŭ cent du dek tri ; Multe pli ol nun ĉe ni ; Estis tute stulta!" .....

### ,& Morala konkludo:

'7 Do, resume ĝi signifas, ; Ke stultaĵo pli postvivas ; Ol valoro kaj merit' ; ; Ol staturo el granit' ; ; In æternum, Amen! .....